

Dimanĉoj sen benzino

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 573, 1974.10.02 & 05

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la vintro 1973-1974 la dimanĉoj sen benzino montriĝis multilate pozitivaj. Tial gestudentoj en Svislando lanĉas proponon, por ke ĉiumonate unu dimanĉo estu rezervata al senbenzina migrado. Pro manko de rilatoj kun politika partio ili malfacile sukcesos en sia strebado. Tamen tre verŝajne multaj gesvisoj subtenos tiun proponon kaj poste voĉdonos favore al senaŭtomobilaj semajnfinoj.

A.- La pasintjaraj senaŭtomobilaj dimanĉoj malfermis al multaj homoj la okulojn al la problemoj propraj al la industria mondo kaj al socio, kiu misuzas energion. Oni konstatis, ĝis kia grado la urboj kaj la kamparoj difektiĝis pro la konstruo de stratoj, ĝis kia grado la bruo de la motoroj nin malhelpas havi veran kontakton kun la naturo, ĝis kia grado la veturilgasoj venenas la urbanojn.

Cl.- La energi-krizo malkovrigis, ke en Svislando la publiko estas grandparte preta akcepti iujn oferojn profite al kontrolo de la ekonomika kreskado kaj al ties limigo. La politikaj partioj, kiuj proponas drastajn rimedojn por la malkreskigo de la loĝantaro per iu ajn rimedo, kiel ekzemple per la forpelo de la fremduloj, ricevas la apogon de kreskanta publiko. Oni sentas, ke la problemoj protekto de la naturo, ŝparo de la energi-misuzo kaj stabiligo de la loĝantaro estas intime ligitaj.

A.- Pro tio ne estas surprizo, ke ĝuste la medioj de la Ligo Svisa por la Protekto de la Naturo publikigis proponon al la svisaj aŭtoritatoj por la limigo de la energi-misuzo. La titolo de tiu 24-paĝa manifesto estas : *Haltu la maŝparo de energio !*

Cl.- Tiu broŝuro estas ege konstruiga. Ĝi proponas tutan politikon pri la energi-konsumado. Ĝin leginte ni estas certaj, ke dum la venontaj jaroj ĝi ludos gravan rolon en la politika vivo de Svislando.

A.- Jen tre resume la enhavo de tiu manifesto :

Cl.- Unue ĝi memorigas, ke depost la fino de la dua mondmilito la loĝantaro en Svislando altiĝis de 4,5 milionoj al 6,3 milionoj da homoj. Samtempe la nacia enspezo kvarobliĝis. Iam oni esperis, ke simila evoluo kapablos feliĉigi la homojn. Bedaŭrinde konstanta kaj senbrida ekonomika kresko rapide detruas la pejzaĝojn, poluas la akvon, la aeron kaj la grundojn. La naturaj vivrimedoj estas misuzataj. La fina rezulto estas kreskanta inflacio.

A.- La aŭtoroj montras tiurilate la respondecon de la politiko pri energio. Ĝia celo estas la kontentigo de ĉiuj bezonoj, eĉ se ili estas absurdaj. Ĝi neglektis la homajn kaj ekologiajn problemojn. Ĝi antaŭvidas senĉesan kreskon de la loĝantaro kaj de ties bezonoj, ĝi metas la landon en kreskanta dependo de la ekstero.

Cl.- La svisaj aŭtoritatoj antaŭvidas la duobligon de energi-konsumado de 1970 ĝis 1985 kaj ĝian triobligon ĝis la jaro 2000. Sed la aŭtoroj montras, ke estas kontraŭdiro inter tiu aserto kaj la promesoj, ke la loĝantaro ĉesos kreski per akceptado de fremdaj laborfortoj kaj ke okazos sistema lukto kontraŭ la natur-detruo kaj poluo.

A.- Fakte ekzistas limoj al la scienco kaj tekniko. Nun Svislando estas unu el la plej dense loĝataj landoj en la mondo. Lasi tiun loĝantaron ankoraŭ kreski signifus elekti la malkreskon de la kvalito de la viv-medio. Se la loĝantaro stabiliĝas, kaj se oni havas respondecan politikon pri energio, fariĝas nekontesteble, ke oni povas fiksi plafonon al la energi-konsumado en Svislando.

Cl.- La aŭtoroj opinias, ke observante ŝpar-politikon tute elteneblan kaj por la ekonomika vivo kaj por la civitanoj, oni povus facile reveni en Svislando al la konsumado de energio, kiu karakterizis la jaron 1968, tio estas al la konsumado de 140'000 terakalorioj.

A.- Terakalorio estas mil miliardoj da kalorioj.

Cl.- Tiuj 140'000 terakalorioj reprezentas 25-foje la energion, kiun nun konsumas Hindion.

A.- Nun Svislando konsumas 170'000 terakaloriojn. La propono de la Ligo Svisa por la Protekto de la Naturo celadas la ŝparon de la diferenco inter tiuj 170'000 terakalorioj kaj la celita normo de 140'000 terakalorioj. La venontan semajnon ni legos al vi tiujn proponojn. Vi konstatos, ke ili estas tute pravigeblaj kaj universale valoraj. Pro tio ni opinias, ke la manifesto de la Ligo Svisa por la Protekto de la Naturo ludos kreskantan rolon en la diskutoj pri la estonteco de la politiko pri energio.

Cl.- La aŭtoroj de la manifesto opinias, ke racia administrado de la energio, kiu estas je nia dispono, havos pozitivan influon sur nian viv-sintenon. La homoj, kiuj kapablas rezigni pri super-abundo da konsumajop kaj kiuj objektive limigas siajn materiajn postulojn, kapablas vivi en kreskanta harmonio kun la naturo. La industria civilizo estas bona, nur kiam ĝi permesas al la homo plenvivi. Nun en pluraj lokoj de la lando ĝi malebligas konvenan vivon. Kaj ĝi foje kaŭzas al la publikaj instancoj pli da elspezoj por la purigado de la akvo kaj la protekto de la medioj, ol ĝi fakte profitdonas.

A.- Politiko pri energio devas limigi kaj reorientigi la ekonomion favore al kreskigo de la individua libereco kaj de la kvalito de la vivo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!